

Numero: 272.  
Januaro: 2015.

23-a jarkolekto

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)  
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# Nova jaro 2015

# Lingvoceano



Denove estas nova jaro. Denove ni fariĝis pli maljunaj.

Kion diri pri tio? – Mi ne scias. – Mi volus kredi, ke tio ĉi estas nur sonĝo kaj baldaŭe mi vekigis.

Ne plaĉas al mi, ke tiom kuregas la jaroj. Ja, ankoraŭ nelonge ni komencis vivi kaj mi estis junulo, kiu mire gapas al la mondo esperante ĉion bonon. Ni revadis pri brila estonto, kaj dume ni rimarkas, ni jam vivas en la estonto. Post ni estas la pasinto, la malfidele forkurantaj jaroj. Ni apenaŭ ion realigis el niaj multaj planoj.

Malgraŭ tio ni ne malesperiĝu! Ni ne sentu, ke ni jam staras ĉe la flanko de tombo. Ankoraŭ ne fermiĝas antaŭ ni la pordoj de la mondo. Nin ankoraŭ atendas multe da surprizoj.

Fakte Esperanto ankoraŭ ne iĝis mondlingvo kaj ĝi ne estas parolata vaste en ĉiu lando. Mi rememoras, kiam mi aliĝis al la tendaro de la esperantistoj, tiam mi kredis, kiam mi maljuniĝos, post jardekoj la zamenhofan lingvon oni parolos en ĉiu lando kaj ĝi estos la dua gepatra lingvo de la homaro.

Ni staras antaŭ nova jaro. Eble nun alvenos la lasta venko kaj Esperanto estos vaste uzata kaj parolata. En la okuloj de multaj homoj ĝi ne estos strangaĵo, senutila afero.

Ni kredu kaj esperu! En iu tago sur la horizonto de Esperantujo ekaperos Suno prilumante egale ĉiun homon. Ili estu kia ajn! Ne gravas haŭtkoloro, religio, sekso. La homaro kune klopodos krei pli bonan vivon, kie ĉie regos paco kaj amo.

Mi scias en ĉies koro tie estas tiu ĉi deziro kaj ni devas fari nur tre, tre malgrandan paŝon.

Ne hezitu ekpaŝi al la pli bona, homa vivo!

-Redaktanto-



Pluraj mil lingvoj ekzistas sur la terglobo. Verdire ekzistas lingvoj, kiujn parolas nur kelkaj centoj aŭ dekoj da homoj. Krome preskaŭ ĉiutage formortas lingvoj kaj malaperas.

Ne estas homo, kiu estus kapabla ellerni ĉiom da lingvoj, eĉ la plej popularajn.

Ni dronas en tiu ĉi giganta lingvoceano kaj ni vane serĉas la elirvojon por ke ni povu komprenigi nin en internacia tereno.

Amasoj lernas diversajn mondlingvojn esperante, ke post la lingvolernado solviĝos la babela ĥaoso. Bedaŭrinde ili rapide devas konsciiĝi, per la lernita lingvo ili havas sukceson nur parte. Fakte la mondo malfermiĝis pere de ĝi, sed samtempe naskiĝis novaj malfacilaĵoj. Baldaŭe ekaperis aliaj antaŭneviditaj problemoj. La lingvoscio neniam estos tiel perfekta, kiel la denaskulo. Li aŭ ŝi ĉiam estos duaranga civitano. Kvankam gramatike li aŭ ŝi scias pli bone la lingvon, malgraŭ tio mankos io, kio ne estas ellernebla.

Ĉu ne estas solvo? La homaro estos en tiu ĉi kirlanta, giganta oceano kaj pro la lingvaj miskomprenoj okazos militoj, katastrofoj, tragedioj.

Espereble alvenos brila tago, kiam la homaro vidos klare kaj unuanime akceptos Esperanton, kiel boaton per kiu la homaro saviĝos de la pereigo.

Estas granda tasko realigi la praan sonĝon de la homaro. Ni ne povas sidi brako en brako trankvile. La mondo malmulte scias pri la zamenhofa lingvo, eĉ oni estas misinformitaj. Ofte ankaŭ oficiale oni asertas pri ĝi stultajojn, kaj de tempo al tempo oni deziras pruvi, ke Esperanto ne estas uzebla sur internacia tereno. Tempoperdo lerni ĝin, pli utile lerni iun vaste disvastigitan mondlingvon.

Esperanto estas verda ŝipo sur la oceano de la lingvoj kaj ĝi surmarigas savboaton vidante la agonion de iu lingvo kaj kulturo.

Lasu eniri nian havenon Esperanton kaj ni ne hezitu enŝipiĝi kaj aliĝi al la kolora tendaro de la geesperantistoj.

-Ŝaŝa-

# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
VII-a

La vespero pasis agrable. Ankaŭ la vespermanĝo estis bongusta. Ili babiladis, ridis. Inter ili estis perfekta harmonio. Johano tute ne komprenis, sia onklino kial estas kontraŭ tiu ĉi ĉarma kaj inteligenta junulino.

Antaŭ ol iri al la randevuo la onklino ankoraŭfoje provis konvinki lin, ke li ne renkontiĝu kun Elinjo.

-Johaĉjo, evitu tiun ĉi virinaĉon! – ŝi petegis preskaŭ plore. – Ne faru al vi malagrablajn, kara nevo mia!

-Kial onklino Izabela? Kial estas malbona renkontiĝi kun tiu ĉi simpatia junulino? Mi vidas nenian danĝeron. Ĉu vi scias ian danĝeron?

La maljunulino ne respondis. Ŝajnis, ke ŝi ne ĝojas pri la decido de sia nevo. Malgraŭ tio ŝi ne volis kontraŭagiti. Johano estas plenkreskulo, kiu mem decidas pri sia sorto.

Fine ŝi demandis indiferente:

-Kiam vi venos hejmen?

-Mi ne scias, kara onklino mia. Ĉu vi koleros, se ĉi nokte mi forestos?

La maljunulino respondis nenion, ŝi nur rigardis serioze en la okulojn de Johano. Kvazaŭ tio ĉi signifus: „Mi garantias, baldaŭe vi pentos kaj vi diros, la oldulino pravus.”



Dumnokte Johano apenaŭ pensis pri sia onklino. Li senĉese rigardis Elinjon. Ŝi pepadis, kiel ĉarma birdeto. Sed ŝi ne estis ĉiutaga virineto, kiel multaj inoj. Kun ŝi oni povis babiladi ankaŭ pri seriozaj temoj.

Li trinkis glason da ruĝa vino, kiu estis farita sur Luno el la tieaj vinbberoj. La vino estis velura, bonodora kaj ĝi bonege estingis la soifon.

En la restoracio estis elegantaj homoj en modaj vestoj. Iomete la kompleto de Johano estis alia kaj bone vidiĝis, ke li devenas el alia planedo. Tio ĝenis nenion. Certe la ĉi tieaj homoj jam al kutimiĝis al fremduloj. Ĉiu scias, la lunanoj estas tre gastamaj, amikemaj homoj. La fremdultrafiko estas bonega negoco ankaŭ sur Luno. Ĝi donas bonegan profiton al la ekonomio. Pli bone akcepti gastojn el diversaj planedoj ol militi.

Johano ege bone fartis kun Elinjo en la restoracio. La mallaŭta muziko ravis lin. Krome ankaŭ la fajra vino hustis al li. Tiam lin ne interesis kiuj sidas ĉe la najbaraj tabloj. Maldekstre sidis du strangmienaj viroj. Ankaŭ ili trinkis saman vinon, kiel Johano. Kial ili ne estus trinkintaj ĉi vinon, se ĝi estas tre populara sur Luno.



Subite li ekstaris kaj ĝentile li diris al Elinjo:

-Pardonu min, mi devas iri al toaleta. Baldaŭe mi revenos.

-Oh, jes, kompreneble – venis rapide la respondo. – Tio estas homa afero.

Li ne pasigis tie kvin minutojn. Reveninte li denove pardonpetis kaj li trinkis kelke da gutoj el la vino.

Elinjo ridetante rigardis al li. Ŝiaj okuloj ĉarme brilis kaj tiun ĉi rigardon Johano neniam povis forgesi.

Li jam ne rememoris pri kio ili babiladis. Kiel li sidis ĉe la tablo neatendite li sentis, ke li fariĝas tre, tre dormema. Komence ankoraŭ provadis lukti kontraŭ la endormiĝo. Li volis eksteri por iri eksteren. Li pensis, ke la nokta aero refreŝigos lin. Sed tio jam ne sukcesis. Lia kapo falis sur la tablon kaj li rememoris pri nenio.

Li vekigis en malhela ejo. Liaj manoj, piedoj, eĉ la tuta korpo estis forte rimenumitaj al litoforma meblo.

-daŭrigota-



# Poezio

Poezio estas la perloj de niaj pensoj. Ĝi elformiĝas sub pezaj premoj de la vivo. Ne en la kapo de ĉiu homo kaŝiĝas tiu ĉi perlo. Multaj el ni nur ĝuas ĝin.

Tial estus necese, se oni legus poemojn ĉiutage. Oni diras la nuna homo ne havas tempon por legi. Prefere oni rigardas televidokanalojn aŭ nenionfarante sidas en drinkejo.

Ĉu tio ĉi estas bona kaj sekvinda? – Laŭ mi ne. Ankaŭ komence de la dudekunia jarcento oni devus legi poemojn.

**Nikolao Hohlov**

**Viburno**

Ĉe serpentuma rivera turno,  
ombrante ŝtonojn de moska put',  
en la umbela ornam' viburno  
sunumas branĉojn sur verda krut'.

Mi ne forgesis – mi ĝin rekonas,  
la kamaradon de l' fora jun';  
en la animo revive sonas  
la pasinteco tra l' muta nun.

Ĉu ne hieraŭ la varman manon  
glacie brogis la akva skvam',  
kaj lipoj trinkis la mirĉampanon  
sub la tintado de l' guta gam'?

Ĉu ne hieraŭ la koro saltis  
pro la senbrida plensanga puŝ',  
ĉu ne hieraŭ apenaŭ haltis  
en kantebrío la arda buŝ'?

Kun la freŝeco de la hieraŭ  
tre zorge gardis la fida kor'  
ĉi tiun puton ĉe la rivero  
kaj la viburnon en la memor',

por ĉe l' revido dolore sveni  
en skua ondo de la pasint',  
kaj, sveniĝante, rezigne beni  
la gutoplendojn de l' plaŭda tint'.



# Poezio



**Ivan Naumov**


**Babelo**

Donu al mi fabelon,  
Ĉar io almenaŭ restu,  
Ĉar io almenaŭ nestu  
En pingloza arbusto  
de mia obskura anim'...  
Kiam oni eniros Babelon  
Ĉies vinoj restos sen gusto  
Kaj ŝimos en ŝlim'.

Donu al mi intencion  
Por io ankoraŭ tremu,  
Por iun ankoraŭ emu  
Longaj ŝtonaj strataroj  
de mia vintroza intern'.  
Kiam oni deklaras komencon  
Ĉies varmo restos sen tegoj  
En frosta kavern'.

Donu al mi nenion  
Laŭ jam forgesita moro.  
Laŭ jam forgesita foro  
Eble glitos ombraro  
de mia neĝoja esper'.  
Kiam oni ektrovos la Dion  
Ĉies dioj restos sen faro  
Kaj mortos sur Ter'.

28/29.06.1993





# Por infanoj

## Knabeto fariĝas sorĉisto



Iam estis, iam ne trans Fabeloceono en la ronda arbaro vivis knabeto kun sia patrino.

En iu tago li decidis fariĝi sorĉisto. Sed li ne sciis, kie aliĝi al tiu ĉi lernejo.

Li ekiris por informiĝi. Unue li demandis la kokon sur la korto:

-Koketo, kie estas la sorĉisto-lernejo?

La ĉefo de la korto estis senkonsila. Ĝi ne povis helpi al la knabeto.

-Mi ne scias, kie estas la sorĉisto-lernejo. Mi proponas al vi, iru al la centjara oldulino, kiu loĝas ĉe la fino de la vilaĝo. Sed estu ĝentila kaj ĝustatempe salutu ŝin. Se pri ti oni forgesiĝos, la oldulino koleriĝos.

La knabeto tuj iris al la vilaĝfino. La maljuna virino sidis antaŭ sia domo sur benketo.

-Bonan tagon, avinjo! – li salutis ŝin ĝentile, kiel proponis al li la koko.

-Bonvenon, knabeto! – ŝi diris. – Kial vi venis al mi?

-La koketo diris, ke vi scias, kie estas la sorĉisto-lernejo. Ĉu vi povas helpi al mi?

-Tion mi ne scias, sed mi havas avinon en la najbara vilaĝo. Iru al ŝi! Ŝi estas pli saĝa, ol mi.

Li adiaŭis de la oldulino, kaj iris al la avino de la oldulino. Ŝi estis tre tre maljuna.

-La birdoj jam diris, kial vi venis – diris ŝi antaŭ ol povintus ekparoli la knabeto. – Bedaŭrinde ankaŭ mi ne scias. Laŭ mi, se vi serĉos mian avinon kiu loĝas sub la tero en malgranda kabaneto, ŝi nepre diros al vi, kien iri al la sorĉisto-lernejo.

-Kiel mi povos iri subteren? – li demandis scivoleme.

-Jen malgranda ŝlosilo. Ĝi malfermas la pordon de la subtera mondo, kiu troviĝas ĉe la plej alta arbo de la arbaro.

La knabeto dankis la ŝlosilon, kaj ekiris por serĉi la pordon de la subtera mondo. Li rigardis, mezuris ĉiun arbon precize. Ĉiufoje li trovis pli altan. Fine jam li volis rezigni, kiam li ekvidis arbon strarantan sola. Ĝi estis tiom alta, ke li ne vidis ĝian supron.

Tie efektive estis granda lignopordo. Li enmetis la ŝlosilon kaj malfermiĝis la enirejo. La knabeto malsupreniris sur naŭdek naŭ ŝtupoj kaj li alvenis la trian oldulinon. Ŝi apenaŭ vidis kaj dum la tuta tago ŝi kuŝis en la lito.

-Venu al mi pli proksime, ke mi vidu, kiel vi aspektas! – ŝi diris. – Se la muŝoj bone informis min, vi serĉas la sorĉisto-lernejon. Ĉu ne?

-Jes – diris mire la knabeto.

-Vi estas ĝustaloke. Vi havas bonŝancon. Mi scias tion. Se vi donas al mi vian junecon, tiam mi diros al vi, kie ĝi estos trovita.

La knabeto ne sciis, kion fari. Se li donos al ŝi sian junecon, tiam li estos maljuna homo. Ĉu tio ĉi estas problemo? – li pensis meditante. – Se mi estos sorĉisto, tiam mi povos serĉi kaj rejunigi min.

Post iom da hezitado li akceptis la proponon, kaj li donis sian junecon al ŝi.

En tiu momento el la oldulino fariĝis belega blondulino. La maljuniĝinta knabo tuj enamiĝis al ŝi. Apenaŭ li atendis, ke la studado pri sorĉo finiĝu kaj li povu june reveni al la belega blondulino.

-Diru al mi rapide, kie estas tiu lernejo! – li urĝigis ŝin.

Post kiam li ricevis la necesajn informojn, li kuregis tien. La profesoroj de la sorĉistoj instruis al li la sciencon de la sorĉado kaj ili trandonis la diplomon pri la akirita kapablo. Do, dum kelkaj jaroj li fariĝis sorĉisto. Tiel li povis rejunigi sin per kelkaj sorĉovortoj.

Li fariĝis belaspekta junulo. Reirante al la belega blondulino li petis ŝian manon. Ankaŭ ŝi volonte akceptis la geedziĝan proponon, kaj baldaŭe ili geedziĝis.

Ili faris tiom grandan geedziĝan ceremonion, ke ĉiu estis invitita, kiu movis kaj spiris sur la terglobo. Ankaŭ mi ĉeestis, kaj tiom multe mi dancis, ke miaj ŝuoj eluziĝis kaj mi devis hejmenveni. Kiel danci nudpiede? Ankoraŭ la gastoj pensus, ke mi estas malriĉulo.

Mi adiaŭis de la juna paro kaj mi deziris al ili multe da feliĉo. Eble ankoraŭ nun daŭras la geedziĝa ceremonio, sed pri ĝi mi scias nenion.

Se vi estas scivolemaj, serĉu ilin kaj vidu propraokule, kio okazis poste.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

**-Onklo Adalberto-**



# Birdonutrado

# Birdonutrado

